

Flandra ESPERANTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Verschiĝnt maandelijks Vertegenwoordiger in Nederland:
Een en twintigste jaarg. L E E N
Nummer 2 (235) sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
FEBR. 1954 postrek. 34563 van P. M. Mabeoone
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTENBOND
POSTBUS 100, MECHELEN
Postrekening 2321.50 van V. E. B.
Raapstr. 74, Gent

LIDGELDEN:
* Leden: 100 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden: 25 fr.
(* met bondsorgaan

ABONNEMENTEN:
België: 75 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

„El Japana Lando kaj Popolo“

Post finlego kuŝas antaŭ ni la libreto nu, nur 20-paĝa. Ĝi enhavas dekduon da „spertoj“, poem- aŭ prozformaj, de infanoj inter 7 kaj 16 jaroj. Ili estas elokventaj per si mem.

Kaj estas io speciala: tiu libreto estas eldonita de la granda entrepreno Heibon-Sya, Tokio, kiu eldonis la ampleksajn „Japana(n) Enciklopedio(n) kaj Japana(n) Vortaro(n) k.t.p. La Direktoro de JAPANA ESPERANTO-INSTYTUTO aldonas jenon:

„I.a. la firmo eldonas ankaŭ serion de „Nia Lando kaj Popolo laŭ prozajoj de Geknaboj“ en 8 volumoj dividitaj mallongaj prozajoj vjerkitaj de lernantoj de elementaj kaj duagradaj lerne- laŭ landopartoj. Ĝi estas kolekto dejoj tra la lando. Ili skizas la pejzaĝojn de siaj vilaĝoj, scenojn en siaj urboj, tradiciajn morojn kaj kutimojn en siaj distriktoj, aktualan vivon de la popolo ĉirkaŭ si.

Ĉiun volumon, en la formato sama kun la sendita broŝuro, ilustras multaj landobildoj, fotografajoj de pejzaĝoj, kaŭ ksilografajojn faritajn de lernejaĵoj moroj, aktualajoj ktp. Ili entenas an- geknaboj. Specimenojn el la libro pre- zentas la sendita (recenzita) broŝureto.

Oni instigis la eldonejon eldoni laŭ simila plano ankaŭ serion da „La Mondo kaj la Popolo de la Mondo“. Heibon-Sya alceptis la konsilon kaj komisiis ia aferon al nia s-ano Sanuroo Ito, kiu sugestis kolekti materialon per Espe- ranto. Aparte por ĉi tiu laboro la eldo- nejo salajras E-istojn.

Samideanoj de ĉiuj landoj, precipe instruistoj de lernejoj elementaj kaj duagradaj estas insiste petataj helpi la aferon. Ili invitu ankaŭ neesperan- tistajn instruistojn (samtempe vekante intereson al nia afero) partopreni en, ĉi tiu internacia kunlaboro. Ili klo- podu ankaŭ presigi ĉi tiun informon en pedagogiaj revuoj kaj lokaj ĵurnaloj por ke la entrepreno estu pli vaste konata (pruvante per tio praktikan utilon de nia lingvo).

Samideanoj pretaj por kunlaboro skribu al la redakcio petante senpa- gan sendon de specimeno. Aliaj sendu I intern. resp-kuponon. La adreso: In- fana Fakoj, Redakcio de Heibon-Sya K.K., Yonbantyo, Tiyoda-ku, Tokio.”

Ĉu substreki ke tia entrepreno estas ege utila ĝenerale kaj ankaŭ el Espe- ranta vidpunkto? Ke kunlaboro estas do nepre necesa?

Notu ke la prozajoj (300—500 vor- toj) aŭ mallongaj poezioj povas esti verkitaj en ĉiuj lingvoj; E-traduko ŝatata. Ili komuniku nur nudan veron rigardatan de la junaj okuloj ... kaj la interesatoj petu informojn ĉe la dirita loko, senprokraste. T. V. G.

Plena vortaro de Esperanto

Ni jam atendis la 4-an eldonon, prizor- gitan de S.A.T. en la nova formato 98 x 145 mm. (antaŭe: 145 x 195 mm.).

La eldonejo komunikas ke la 512 unuaj paĝoj estas jam pretaj, sed la SUPLEMEN- TO suferis prokraston, pro tio ke la pres- isto konstatis la malaperon de kelkaj matri- coj, kiujn li ricevis nur la 10.12.53.

La tuta libro aperos en marto 1954: ĝia prezo ne jam estis konata.

La SUPLEMENTO ampleksos proks. 60 p. kaj entenas radikojn kaj difinojn de vortoj ĉiufakaj; ĝi estas kompilita de prof. Waringhien kun kvin membroj de la E. Akademio kaj aliaj fakuloj.



39a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - HAARLEM

Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando
31-an julion - 7-an aŭguston 1954

OFICIALA KOMUNIKO

Pagoj: Rotterdamsche Bank, Haarlem. Poŝtgirkonto 604997.

Grave: La L.K.K. akceptas nur pagilojn ŝanĝeblajn en banko k.s. Ĝi absolute ne akceptas librojn aŭ varojn.

Multaj personoj ankoraŭ sendas aliĝilojn al Haarlem kaj pagojn al perantoj. L.K.K. petas, ke oni sendu aliĝilon kaj pagon al la sama instanco, ĉu al Haarlem, ĉu al peranto.

Multaj personoj pagis sen aliĝilo. Sen detaloj ne eblas enskribi la aliĝon. Se oni ne havas aliĝilon petu tion de landa asocio. Ne sendu ian ajn paperon, kiu eble ne konformas al la arkiva sistemo.

Dua Bulteno: La Dua Bulteno estas en la presejo kaj atingos ĉiujn aliĝintojn en januaro. Kun ĝi estos la oficialaj Mendi- loj por loĝejoj kaj ekskursoj. L.K.K. akceptos mendojn NUR per tiuj dokumentoj, kiuj formas parton de la arkiva sistemo. Sekve, ne mendu per letero aŭ poŝtkarto.

Fakaj asocioj: La L.K.K. disponigos senpage salonojn al „kunlaborant- aj fakaj asocioj“ (de U.E.A.). Aliaj asocioj devos pagi. Aŝocioj dezirantaj salonojn por fakaj kunsidoj kiel eble plej baldaŭ komuniku tion al L.K.K. kun indiko pri la atendata nombro, kiu ĉeestos. La Oficiala Programo estas en preparo. Post aprobo de U.E.A. ŝanĝoj kaj aldonoj estos fareblaj nur post novaj konsultoj kun la Estraro.

Karavanaj aranĝoj: La L.K.K. avertas, ke ĝi neniel helpos al aŭ kun- laboros kun privataj aranĝantoj de karavanoj, kiuj memstare agas. Al tiaj aranĝantoj, kies agoj povas malutili al la organizado de la kongreso, la L.K.K. povas, laŭ la Kongresa Regularo, rifuzi aliĝon.

Sveda Esperanto-Federacio informis, ke ĝi rajtigis aranĝi karavanon al Haarlem: Ungdomens Resebyra, Jungfrugatan 30, STOCKHOLM O, pere de S-ro K. E. Karlsson.

Kotizoj: Multa konfuzo ekzistas pri la kotizoj de edzinoj. Jen ekzem- ploj (por la dua periodo):

Edzo (kaj ĉiu plenkreska homo)	guld. 22.—
edzino	„ 11.—
Edzo (membro de U.E.A.)	„ 19.50
Edzino de membro	„ 9.75

La limo de partopreno en la kongreso estas 2000 personoj. Post atingo de tiu cifero L.K.K. rifuzos pliajn aliĝojn. Cetera ankaŭ post la 30-a de junio aliĝo estos nebla.

Statistiko: (ĝis fino de 1953): Aŭstrio 6, Belgujo 30, Britujo 133, Bra- zilo 3, Danujo 20, Finnuloj 17, Francujo 20, Germanujo 92, Hispanujo 3, Indonezio 1, Italujo 42, Japanujo 1, Jugoslavio 50, Kanado 2, Kostariko 1, Nederlando 361, Norvegujo 37, Novzelando 9, Portuga- lujo 3, Svedujo 76, Svisujo -6, Turkujo 2, Usono 5. Sumo 930 el 23 landoj (pasintjare 458). Aktuale jam pli ol 1.300 (Red.)

Mason Stuttard,
Konstanta Kongresa Sekretario.

La Antaŭkongreso en Antverpeno

La L.K.K. de la Beneluksa Kongreso Antverpeno 1953, kiu iĝis la L.K.K. de la Antaŭkongreso, kiu okazos en tiu urbo, de la 28a ĝis la 30a de julio proksima, t.e. la tri tagojn antaŭ la komencigo de la Haarlema Universala Kongreso, kunvenis dimanĉon, la 17an, kaj prenis jam firmajn decidojn pri la kunmeto de la provizora programo:

Merkredon, la 28an de julio:

Antaŭtagmeze: Malfermo de la akceptejo
Unua kontakto kun la urbo

Posttagmeze: Malferma kunsido kaj bonvenigo de ĉiuj partoprenantoj
Vizito al la Plantin-Muzeo

Vespere: Interkonatiĝa Vespere: Balo

Ĵaŭdon, la 29an de julio:

Antaŭtagmeze: Kultura horo

Oficiala Akcepto en la Urbdomo

Posttagmeze: Sipveturado sur la Skeldo kaj vizito de la haveninstalaĵoj
Vespere: Granda Vesperfesto kun teatraĵeto, kantoj kaj skeĉoj.

Vendredon, la 30an de julio:

Antaŭtagmeze: Vizito al la Rubensdomo

Tagmeze: Oficiala inaŭguro de la Dr. Zamenhofstrato

Komuna Festmanĝo.

Posttagmeze: Vizito al unu el la grandaj industrioj en la Antverpena urbego
kiel estas: la grandaj petrolinstalaĵoj, la aŭtomobilfabrikoj kaj/aŭ aliaj.

Vespere: Intima adiaŭa kunveno, en gaja atmosfero.

Sabaton, la 31an de julio:

Antaŭtagmeze: Komuna foriro al Haarlem.

Kiel dirite en antaŭ komuniko, la kotizo por tiu ĉi Antaŭkongreso estas Belgaj Frankoj 50, kiujn oni de nun povas pagi al la P.C.K. de la L.K.K.-kasisto: S-ro A. Pittoors, Deurne No. 40.89.41.

Frua aliĝo estas dezirinda por bona efektiviĝo de la preparaj aranĝoj. Do ne prokrastu vian aliĝon.

La adreso de la L.K.K. estas ĉe la sekretario S-ro H. Sielens, Houwerstraat, 12 Antverpeno.

ESPERANTO-EKSPOZICIO EN MONTEVIDEO

Okaze de la Oka Sesio de la Genera- la Konferenco de UNESKO en Monte- video (de la 14a de oktobro ĝis la 13a de novembro 1954) CED aranĝos, en kunlaboro kun la Urugvaja Esperanto- Societo, grandegan Esperanto-ekspozici- on. Ĝia celo estas prezenti en taŭga formo ĉiujn atingajojn de Esperanto en la 66 jaroj de ĝia ekzistado. La eks- pozicio estas unu el la ĉefaj branĉoj de la multflankaj klopodoj digne prezenti la aferon de la Internacia Lingvo en Montevideo. La ekspozicio havos jen- najn fakojn:

A. **LERNOLIBROJ:** 1) Ŝlosiloj; 2) Na- cilingvaj lernolibroj de Esperanto; 4) Vortaroj.

B. **VERKOJ DE ZAMENHOF:** 1) Ori- ginalaj verkoj; 2) Tradukitaj verkoj; 3) Nacilingvaj tradukoj de diversaj verkoj de Zamenhof.

C. **BELETRISTIKO:** 1) Verkoj origina- le skribitaj en Esperanto; 2) Tra- dukoj el nacilingvaj literaturoj; 3) Nacilingvaj tradukoj el Esperanto.

D. **SCIENCŬ KAJ FILOZOFIO:** 1) Fa- kaj vortaroj kaj terminaroj; 2) Ver- koj originale skribitaj en Esperanto; 3) Tradukoj el naciaj lingvoj; 4) Tradukoj el Esperanto en naciaj lingvoj; 5) Esperantlingvaj resumoj al nacilingvaj verkoj; 6) Gravaj rez- olucioj pri la valoro de Esperanto por sciencaj celoj.

E. **GAZETOJ KAJ REVUOJ:** 1) Gene- ralaĵoj gazetoj iam aperintaj aŭ nun aperantaj; 2) Literaturaĵoj revuoj; 3) Sciencaj gazetoj, revuoj kaj bul- tenoj; 4) Aliaj specialaj revuoj, in- ter kiuj ankaŭ la nacilingvaj revuoj kun Esperantaj resumoj aŭ rubri- koj. (En tiu-ĉi fako estos ekspozici- itaj ĉiuj iom gravaj gazetoj kaj revuoj, sed, se ili ne plu aperadas, nur tutjaraj kompletoj).

F. **DIVERSAJ PUBLIKAĴOJ:** 1) Turis- maj gvidlibroj; 2) Prospektoj pri di- versaj urboj; 3) Afisoj kaj prospek- toj de diversaj entreprenoj kaj insti- tucioj.

G. **RADIO:** Per trafa desegnaĵo prezen- ti la evoluon de la Esperant-lingvaj elsendoj, listo de radiostacioj, kiuj elsendas en Esperanto; se iel eble, estos organizita disaŭdigo de Espe- rantaj elsendoj dum la ekspozicio mem.

H. **FILMO:** Se iel eble, estos organizita prezentado de Esperantlingvaj filmoj.

I. **KONGRESOJ KAJ KONFERENCOJ:** Unuarangaj fotografajoj pri Univer- salaj Kongresoj, pri fakaj kongresoj kaj konferencoj, pri Internacia Some- ra Universitato, pri internaciaj kur- soj someraj semajnoj, k.t.p.

J. **ORGANIZO DE LA ESPERANTO- MOVADO:** 1) UEA kaj listo de lan- daj asocioj kaj fakaj organizaĵoj ali- ĝintaj al UEA; 2) Listo de aliaj in- ternaciaj Esperanto-organizaĵoj; 3) Listo de la ĉefaj Esperanto-eldonejoj.

En tiu ĉi fako troviĝos mapo de la mondo, sur kiu estas signitaj la ur- boj, en kiuj troviĝas: a. delegitoj aŭ fakdelegitoj de UEA (verda flageto); b. Esperanto-eldonejoj, redakcioj de gazetoj kaj revuoj, sidejoj de Espe- rantaj internaciaj organizaĵoj kaj in- stitucioj (flava flageto); c. Esperan- to-societo aŭ grupoj (ruĝa flageto).

K. **OPINIOJ PRI ESPERANTO:** Elek- titaj eldiroj pri Esperanto de famaj sciencistoj, filozofoj, verkistoj, poli- tikistoj kaj aliaj gravaj personoj.

L. **NACILINGVA LITERATURO PRI ESPERANTO:** Verkoj broŝuroj, stu- doj pri Esperanto, publikigitaj en naciaj lingvoj.

La tuta ekspozicio estos arte aranĝita kaj ornata por portreto de D-ro Za- menhof, fotoj de la unuaj Esperantistaj renkontiĝoj, flagoj (laŭ ebleco ankaŭ per la grandega flago de la Universa- laj Kongresoj), floroj k.t.p.

La ekspozicio en Montevideo devas fariĝi impona elmonro de ĉio, kion kreis la Esperanto-Movado. Ĝi devas montri la kulturalan valoron de la Inter- nacia Lingvo, kaj ĝian socian signifon. Ĝi devas esti potenca atestilo pri la for- to de la Esperanto-Movado.

La materialo de la ekspozicio estas sendota al: R. Garcia, Calle Yaguaron 1397, Montevideo, Urugvajo.

Prof. I. Lapenna.

Pri J.B.

En la Bulteno de Esperantista Klubo en Praha — kiu mem povas aperi nur je du stencilitaj paĝoj, ni ĉerpas enhavon de letero, skribita de konata literaturisto, aŭtoro de pluraj romanoj kaj poemkolektoj, (nu vi certe rekonos lin per la komenclitro de lia nomo):

„El via letero, kvankam vi klopis resti seka raportanto, venis freŝa alblovo, optimisma admono al mi kaj al miaj amikoj, al kiu mi legis vian leteron. Ne miru! Ni ja tute ne havas okazon kaj ejon por kunvenoj, kaj nur hazardoj renkontigas nin jen surstrate, jen ĉe iu oficejo ktp. Kvankam ni iom envias la ĉeĥoslovakajn E-istojn pro eblecoj, kiujn ni ne havas, tamen ni ĉiuj tre ĝojas, ke persisto kaj entuziasmo por tia kulturmovado, kies utilon eble timas eĉ tiuj, kiuj ŝatas prediki pri internacia homa solidareco. Tamen la historia evoluo pravigos nin. Tam ankaŭ en nia urbo prosperis tiel la kluba vivo kaj dank' al tio eĉ nun ekzistas tiom da celkonsciaj adeptoj, kiuj sufiĉas por rekomenci la laboron. Ni atendas la momenton, kiam la kultura miopeco ne plu malhelpos la disvolviĝon de sopiroj, kiuj deziras havi faktan rimedon por krei pacon, justecon kaj homan solidarecon inter la popoloj.

...Nun estas mia vico peti vin, ke vi ne forgesu transdoni la salutojn kaj plej sincerajn bondezirojn al viaj klubanoj, al viaj kunlaborantoj kaj al ĉiu samideano, kiu akcelas ĉu per studo, ĉu per laboro nian movadon. Esperon!”

Cu komento necesa?

Bibliografio

TRIESTO...AL KIU? Eldonis Slovenia Esperanto-Ligo, Ljubljana, 1953. Broŝ., 44 p. 14 x 20; 2 kartoj.

Oni ankaŭ ne forgesis la viglajn, minacajn protestojn de Jugoslavujo, kiu kaŭzis sufiĉe da maltrankvilo kiam antaŭ nelonge la usona kaj brita registaroj konigis sian intencon transdoni la malgrandan Zonon A, kun la urbo Triesto, al Italujo. Kaj multaj miregis tiutempe pro la ŝajne nepravigebla apetito jugoslava.

Opiniante, ke la eksterlando ne povas fari al si objektivan prijuĝon surbaze de nekompletaj aŭ unuflankaj informoj el propra gazetaro, S.E.L. eldonis ĉi tiun broŝuron por eksponi ankaŭ la starpunkton de Jugoslavujo, kiu konkretiĝas en jena konkluda propono:

1) internaciigo de Triesto, (Triesto nuntempe fakte havas itallingvan plimulton; sed, kiel haveno, itala Triesto ne estas vivipova, se Italujo ne kontrolas ankaŭ la jugoslavanan fonon. Tiel itala Triesto fariĝos daŭra minaco al paco.)

2) kunigo de la resto de Zono A kun Zono B en aŭtonoma teritorio sub suvereneco de Jugoslavujo: la enloĝigantaro estas ja nekontesteble jugoslava.

Certe estas konsilinde ekkoni la vidpunktojn de ĉiuj interesataj partioj antaŭ ol definitive decidi pri gravega demando kiel paco-malpaco, kaj en tiu rilato la broŝuro estu bonvena.

F. C.

HIROŝIMA; kompilis: Kansai Ligo eld. Japana E-Librokooperativo, Osaka 1952, p. 16.

La broŝureto montras kelkajn bildojn el la filmo „Infanoj de l'Atombombo, kun klarigaj tekstoj en E. Havebla kontraŭ 2 resp. kup. ĉe la Kooperativo, 72, Kitaogimaci, Kita-ku, Osaka, Jap.

LA BAPTO DE CARO VLADIMIR, de Karel Havlicek Borovsky; trad. el la ĉeĥa: Pumpr Tomas; eld. Serio Stafeto, 1953, p. 141. Recenzota.

RAKONTOJ DE VEL KINTA FOLIO de V. Eroŝenko; eld. E-Librokooperativo, Osaka (Jap.), 1953, p. 40. Recenzota.

ESPERANTO-TANGO, muziko kaj teksto de Jac. Feitsma. Eldonita okaze de la 39-a U.K. de E. en Haarlem fare de ESPERANTO-MUZIKGRUPO, Antwerpsestr. 45, Bergen-op-Zoom, Ned.

FLORBULOJ, ANKAŬ EN VIA GARDENO.

Bela multkolora faldfolio, senpage havebla ĉe: Centra Florbulba Komitato, Wilhelminastr. 13, Haarlem, Nederlando.

Internacia Ferio-Semajno en Konstanz (Germ.), 24-30/7/54

Por akiri informojn kaj prospekton, skribu al: IFS Esperanto, Grüngang 8, Konstanz, Germanujo.

La Beneluksa Kongreso en Lieĝo

La L.K.K. — tiel kiel ni citis ĝin en nia antaŭ numero, sed en kiu listo la nomo de S-ro P. M. Mabesoone estas anstataŭenda per tiu de S-ro F. Weeke —, vigle laboras.

Nun jam ĉio ŝajnas grandlinie preta:

La Honora Komitato estas preskaŭ tute kunmetita; la plimulto el tiuj, kiujn oni pripetis, akceptis kaj la Urbeŝtaro ankaŭ jam oficiale decidis, ke la Kongresanoj estos akceptataj en la Urbdomo, en la dimanĉa tago.

Pri la ekskursoj nur estas ankoraŭ hezito, ĉar la okazoj en la Lieĝa regiono estas tiel multnombraj:

Tutapude estas la nederlanda Limburgo kaj oni tie povus vidi okazon por vizito al nederlandaj esperantistoj kaj pejzaĝaj belaĵoj; sed ankaŭ la belgaj Ardenoj estas allogaj; kaj sur la Mozo veturas plezurŝipoj...kaj Lieĝo estas industria centro!

En la diverseco de ĉi tiuj eblecoj kuŝas malfacilaĵo por la organiza komitato. Certe ĝi tamen ricevis kaj ricevos konsilojn aŭ sugestojn pri plej bona elekto kaj do baldaŭ trafos finan decidon. Jen do la provizora programo:

Sabaton, la 5an de junio:

Tagmeze: Malfermo de la akceptejo
 Posttagmeze: Kunsidoj de Belga kaj Flandra Esperanto-Institutoj
 Laborkunsidoj de Belga kaj Flandra Ligoj
 Kultura horo
 Oficiala Malferma Kunsido de la Beneluksa Kongreso
 Vespere: Kongresa Balo.

Dimanĉon, la 6an de junio:

Matene: Diservoj
 Antaŭtagmeze: Solena kunsido de RBLE
 Jarkunsido de F.L.E.
 L.E.E.N., — pro la Universala Kongreso, — ne okazigos oficialan kunsidon.
 Tagmeze: Akcepto en la Urbdomo, fare de la urbeŝtaro
 Oficiala fotografado
 Komuna Manĝo
 Posttagmeze: Promenado tra la urbo kaj vizito de muzeo aŭ vidindaĵo
 Vespere: Granda Vesperfesto, kun la kunlaboro de diversaj grupoj de ambaŭ enlandaj Ligoj, kiuj jam firme promesis programerojn.

Lundon, la 7an de junio

Dediĉata al ekskurso kaj/aŭ vizitoj.
 En sekvonta numero, kiam la lastaj detaloj pri farotaj pagoj estos enordigataj, ni kunsendos aliĝilon.
 Sed intertempe ni tamen jam insistas por ke ĉiuj niaj membroj, kiuj vojaĝos Lieĝen aŭ kiuj volas subteni la organizon de niaj Kongresoj, ĝiru la sumon de Fr. 50,— al Poŝtĉekkonto No. 10.06.30 de la Beneluksa Esperanto-Kongreso, St. Gilles.
 Ne plu temas nur pri la Honora Kolono, sed vere pri la kolonoj, sur kiuj ripozos la tuta konstruaĵo. Kaj la L.K.K. nun jam devas scii pri kia sumo ĝi disponos kaj de kiaj salonegoj ĝi devas antaŭvidi la ludon.
 Do ĉiuj plenumu rapide sian unuan devon.

La Loka Kongresa Komitato.

Monata Bulteno de la Libro-Servoj

VINTROTEMPO — LIBROTEMPO

Por la studemuloj:

	Gld.	Fr.
De voorzetsels in Esperanto (Degenkamp)	2,50	26,—
Tra la labirinto de la gramatiko (Faulhaber)	5,90	85,—
Post la kurso (de Bruin & Faulhaber)	2,—	
Historio de la lingvo Esperanto I (Privat)	1,50	22,—
Historio de la lingvo Esperanto II (Privat)	2,75	45,—
La Konsilanto (Degenkamp)	2,75	
Esperanto leren lezen (Makkink)	1,—	15,—
Hoe kan ik het in Esperanto zeggen?	0,35	5,—
Honderd vragen over gramatica en onderwijs	0,35	5,—
Plena Vortaro	11,50	
Zakwoordenboekje (Alings)	0,50	
Zakwoordenboekje (Debrouwere)		5,—
Meulenhoff's woordenboek	3,90	53,—

Por la legemuloj:

Palaco de danĝero (Wagnalls) pri Sino Pompadour	(bind.) 3,50	50,—
Akbar (Limburg Bower) Orienta romano	(bind.) 3,50	56,—
La Cikoni-kaliĝo (Babits)	broŝ. 1,20	21,—
Al Torento (Engholm)	broŝ. 1,30	20,—
La granda aventuro (Szilagyi) novelaro	bind. 5,75	55,—
La amo en la jaro dekmil (Etola)	bind. 3,75	45,—
La dormanto vekiga (Wells)	bind. 3,25	40,—
D-ro Dornier (Egerup)	broŝ. 4,—	56,—
Fabiola (Wiseman) Romano pri la katakomboj	broŝ. 4,50	
id. id. id.	id. id.	80,—
Se auskultas la animo (G. Gezelle) poemaro	broŝ. 1,20	15,—
Bemerking voor V.E.I.-klienteel: het sinds tientallen jaren in Vlaanderen gekend leerboek voor Esperanto WITTERYCK is totaal uitgeput en werd vervangen door Esperanto leerboek F. Randi.		

MENDU ĈE:

Boekendienst LEEN, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O (giro 769.15)
 Vlaams Esp. Instituut, Blankenbergse St.weg 72, Brugge (P.c.r. 3268.51)

ĈU ESPERANTO „FREMDA LINGVO“

En Aŭstralio ekzistas leĝo, iom simila al tiu voĉdonita antaŭ kelkaj jaroj en Brazilo, kaj laŭ kiu ĉiu gazeto, presita en „fremda“ lingvo, devas enhavi almenaŭ unu kvaronon de la teksto en la nacia lingvo, tie do la angla lingvo.

La organo de Aŭstralio Esperanto Asocio, ĉe la oficialigo de tiu ĉi leĝo en 1947, petis la permeson daŭrigi la aperigon de sia revuo „La Rondo“, kiu cetere enhavas kutime, ekster la esperanto-tekstoj, ankaŭ artikolojn en angla lingvo. Kaj ĝi akiris la prespermeson.

La gvidantoj tamen sen plezuro vidis Esperanton, konsiderata kiel „fremda lingvo“, kaj, en la lasta tempo, konfaktis la koncernen aŭtoritaton por

konsiderigi Esperanton ne kiel fremdan, sed kiel universalan lingvon, al kiu do ne rilatas la pritemata leĝo.

Ni nun ekscias, ke la klopodoj de la estraro de Aŭstralio Esperanto-Asocio estas kronitaj per plena sukceso: La decido laŭ kiu oni al ili permesis presigi ilian revuon en la „fremda“ lingvo Esperanto, estas nuligita, kun la jena konsidero: „ke Esperanto ne estas fremda lingvo en la senco antaŭvidita de la suprecitata leĝo“.

Niaj brazilaj samideanoj siatempe akiris similan decidon kaj do, en du landoj jam, la oficialaj instancoj akceptis la vidpunkton, ke Esperanto ne estas fremda lingvo, kontraŭ kiu naciaj aŭtoritatoj kredas ke ili devas batali, sed universala helplingvo, kiu ne celas forigi, kiel ajn, la naciajn lingvojn.

La Studanto

Traduko de la antaŭnumera

Ekzerco 11 B:

NEŬTRALA LINGVO BEZONATA 1)

Usona eksportisto havis komercajn rilatojn kun brazila 2) importisto 3). La usonano (nordamerikano) uzis por siaj 4) cirkuleroj, faldfolioj kaj korespondadoj pro facileco sian 4) propran lingvon, amerike anglan. Ĉar ĉi tio 5) ofte kaŭzis malfacilaĵojn, eĉ miskomprenojn por la brazilano 2), li petis la usonanon uzi la lingvon (korespondi en la lingvo) de la lando, kun kiu li rilatis, do por Brazilo la portugalan (en la portugala). Se tio donus 6) al li malfacilaĵojn 7), la uzado de Esperanto estus tre ŝatata. Ĉial aprobinda peto.

Friso 8) havis monpostulon al (rajtis postuli monon de) flandra komisiinto, kiu pagis sian 4) ŝuldon pere de banko en Bruselo 9). La brusela banko sendis al la friso 8) ĉekon, kiu estis formulita 10) en... la franca lingvo. (daŭrigata)

Rimarkigoj:

- 1) Ankaŭ: necesa = nepre bezonata.
- 2) Pluraj vortaroj donas la formojn: Brazilo, brazilia, braziliano. „Plena Grammatiko“ (poste indikita per P.G.), la brazilanoj mem kaj do ankaŭ mi preferas la formojn: Brazilo, brazila, brazilano.
- 3) Eksporti (= elporti) kaj importi (= enporti) estas internaciaj komercaj fak-esprimoj enkondukitaj en Esp. laŭ la 15-a regulo de la 16-regula grammatiko.
- 4) Indikas la posedon de la subjekto; do nepre si —.
- 5) Ankaŭ: ĝi (= la angla lingvo); „ĉi tio“ rilatas al la enhavo de la tuta frazo.
- 6) Kondicionalo estas uzata por esprimi agon nerealan, fiktive imagitan, sed ankaŭ por esti malpli truda, ĝentila.
- 7) Ankaŭ: se tio embarasus lin.
- 8) Mi preferas la formojn: Frislando, frisa kaj friso, kvankam pluraj vortaroj donas la formojn: Frizlando, friz(on)a kaj frizo. Laŭ mi frizo = krispigo de la haroj.
- 9) Ankaŭ: kiu igis bankon en Bruselo pagi lian ŝuldon (nun subjekto de „pagi“ estas: „banko“).
- 10) Ankaŭ: redaktita. Ankaŭ: ĉekon formulitan en... la franca lingvo. (daŭrigata)

NOVAJ EKZERCOJ

Ekzerco 14 A:

Aldonu la gravan literon n, kie necesas: Sinjoro Krivoĉ estis fama operkantisto. Tie bela voĉo li havis. Li volis konservi ĝi bela kaj tial evitis ĉio, kio povus fari lia gorĝo rauka. Li volis iri en alia lando por tie akiri same granda famo, kia li jam havis en sia propra lando. Li serĉis kontakto kun operdirektoro kaj kantis antaŭ tiu diversaj arioj. La direktoro montriĝis tre kontenta: li opiniis la voĉo bela kaj la arioj aŭskultindaj.

„Mi esperas, ke ankaŭ mi povas esti kontenta pri via ario.“ diris s-ro Krivoĉ.

„Ĉu vi atendas de mi ario?“ kun miro demandis la direktoro.

„Mi ne povas kanti arioj nur pro la honoro.“ diris s-ro Krivoĉ. „Mi atendas de vi bona honorario“.

„Kantante la ario tiom bele, vi rikoltos honoro. Do vi jam havas honor-ario.“ serĉe diris la direktoro.

Ekzerco 12 B:

Forigu la kursivan konjunkci(aj)on kaj elekto la ĝustan adverban particon:

1. Kiam li estas hejme, s-ro Legemulo ŝatas legi ĵurnalon aŭ libron.
2. Post kiam li estas salutinta siajn edzinon kaj infanojn, li serĉas legajon.
3. Antaŭ ol li manĝas kaj eĉ dum li manĝas, li glutas literojn per la okuloj.
4. Pro tio, ke ŝi preferas babilon, la edzino ne ŝatas le legemon de la edzo.
5. Hieraŭ, kiam ŝi havis multajn novaĵojn, ŝi elpensis ruzon.
6. Post kiam ŝi metis ĉiujn legajojn en la libroŝrankon, ŝi ŝlosis la ŝrankon.
7. Antaŭ ol li venis, ŝi kaŝis la ŝlosilon.
8. Kiam li estis veninta hejmen kaj serĉis legajon, li tuj rimarkis la ruzon.
9. Li nenion diris, sed pensis: Morgaŭ antaŭ ol mi iros al mia laboro, mi metos revuon en mian poŝon kaj kiam mi estos veninta hejmen, mi tuj povos eklegi.
- 10: Kiam edzino estas ruza, la edzo kelkfoje estas pli ruza.....

Ekzercojn korektotajn sendu antaŭ la 10-a de febr. 1954 flandraj Esperantistoj al V.E.B., „La Studanto“ - postbus 100 - Mechelen; nederlandaj al S. S. de Jong Dzn., Waltaweg 3, Tjerkwerd (Fr.).

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst: Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.
 Penningm.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563.
 Boekendienst: S. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postrek. 76915.
 Schr. cursus voor gevorderden: H Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.
 Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
 Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
 Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermewuustr. 29, Badhoevedorp
 Cerdel. U.E.A.: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Postrek. 242619.
 Vic-ĉefd. F. Weeke, Zwolseweg 172 A, Diepenveen. Postrek. 22075.

Komunikoj de la Ĉefestraro

La sekciaj estraroj nepre resendu la suban parton de la mandato por la delegitoj al la jarkunveno antaŭ la 15-a de marto al la ĝen. sekr. s-ro A. J. Kalma kaj instigu siajn anojn grandnombre iri al Amersfoort la 4-a de aprilo. La eniro estas senpaga, komuna varma lunĉo (partopreno ne deviga) kostas inkl. de trinkmono g. 4,—. La delegitoj kiel kutime ricevos siajn elspezojn por la vojaĝo kaj la lunĉo laŭ la tarifoj, fiksitaj en par. 36 de nia regularo. La ĝen. kasisto urĝe petas la sekciajn kasistojn pagi la kotizon por la unua duonjaro 1954. Notu, ke laŭregulare la ĉefestraro rajtas malpermesi al delegitoj de nepagintaj sekcioj funkcii kiel sekciaj reprezentantoj.

Denove ni atentigas pri la bonega informilo „Rapport over de internationale taal Esperanto”, verkita de prof. I. Lapenna. Pri la enhavo vi konsultu la deembran numeron 1953 de nia organo. Imitu la ekzemplon de Amsterdam kaj Leeuwarden kaj mendu ĉe la ĝen. sekretario kvanton por dissendo al aŭtoritatuloj, ktp. Prezo po g. 0,10.

Kongresanoj, pretaj iel helpi per libervola kelkhora deĵoro en la kongresejo, anoncu sin skribe ĉe la ĝen. sekretario, s-ro A. J. Kalma. La hidrargo en la kongresa termometro febre altiĝas! Meze de januaro la nombro da kongresanoj jam superis 1300! S-ro ing. H. R. G. Isbrucker, honora prezidanto de la L.K.K., havis trafik-akcidenton en Francujo. Ni ĝoje informas vin, ke li fartas jam tiel bone, ke

li versajne revenis al Nederlando antaŭ ol vi legas ĉi tiun komunikon. Ni deziras al li plenan kaj baldaŭan resaniĝon!

Proponoj por la jarkunveno

Sekcio Merkurio (R'dam) proponas, ke la jarkunveno esprimu sin pri la demando ĉu L.E.E.N. kiel neŭtrala asocio rajtas akcepti sekciojn, kiuj havas evidente klaran religian aŭ politikan tendencon.

Klarigo: L.E.E.N. celas esti neŭtrala. Kiel neŭtrala asocio ĝi rajtas akcepti membrojn, ne atentante ilian politikan aŭ religian konvinkon, sed certe ne grupojn, kiuj havas neneŭtralan karakteron kaj ankaŭ klare esprimas tion per siaj nomoj. Aliĝo de membro kaj de grupo estas du esence tute diferencaj aferoj. Per la unua estiĝas kaj daŭras la neŭtraleco, per la dua la neŭtraleco principe perdiĝas.

Opinio de la ĉefestraro: Par. 2 de nia statuto tekstas: De vereniging stelt zich ten doel, met vermijding van alle vraagstukken op godsdienstig of partijpolitiek gebied, de verbreiding van de internationale taal te bevorderen. L.E.E.N. estas ĝenerala asocio- Ĉiu membro rajtas individue reprezenti iun religian aŭ politikan tendencon. Same tion povas fari sekcio, se ĝi nur ne agas kontraŭ la ordo de nia ŝtato aŭ la moralo. Krome ĉiu sekcio devas deklari, ke ĝi akceptas nian statuton kaj ne rajtas fari regularon, kiu kontraŭas ĝin. Oni komparu la situacion kun tiu de U.E.A., kiu mem ne havas religian aŭ politikan tendencon, sed akceptas diverskolorajn grupojn kiel fakajn.

ASOCIA JARRAPORTO LA ESTONTO ESTAS NIA

La fakto, ke en 1953 nur malmultaj sekcioj sukcesis aranĝi kursojn, povus pravigi la opinion, ke nia movado fartas malbone, sed tamen tiu opinio ne estas ĝusta. Ni daŭre gajnis terenon. La kursgvidajn taskojn ja parte transprenis la populuniversitataj (Amsterdam, Haarlem, Den Haag, Utrecht) kaj kelkaj gazetoj (Winschoter Courant, Gooi- en Eembode, Typhoon, Bussumse Courant). La praktiko tamen montris, ke multaj partoprenintoj en tiaj kursoj ne kuraĝas fari la salton, kiu kondukas ilin en la sekciojn, ĉar la lingva kapablo de la sekcianoj ĝenerale superas tiun de la novbakitaj esperantistoj. Felice kelkaj sekcioj kontentige solvis tiun problemon, aranĝante specialajn studklubetojn aŭ konversaciajn rondojn por tiuj kursanoj, tiel faciligante al ili la salton trans la abismon. Pri la progreso de nia afero ankaŭ atestas la multaj artikoloj, kiuj lastatempe aperas en la gazetaro. Krome la alproksimiganta Universala Kongreso, al kiu aliĝis la 13-an de januaro jam 1300 kongresanoj, kompreneble efikas favore.

La propagando tamen lasis multon por deziri, ĉar kvankam kelkaj lokaj kunlaborkomitatoj (Amsterdam, Den Haag, Rotterdam) montris ĝojigan aktivecon, pluraj sekcioj sin okupis nur pri la problemoj kiel aranĝi interesajn grupvesperojn kaj tute neglektis la propagandon. Kiom ajn necesaj altnivelaj programoj estas por reteni la anojn kaj pligrandigi ilian lingvan scion, oni neniel sukcesos varbi novajn adeptojn nur per aranĝo de interesaj kunvenoj, pri kiuj eksterstarantoj tute ne estas informitaj. En novembro aperis bonega raporto pri Esperanto, verkita de prof. d-ro I. Lapenna, direktoro de C.E.D., unu el la plej efikaj informiloj ĝis nun aperintaj, sed estas plorige, ke nur du sekcioj (Amsterdam kaj Leeuwarden) ĝis nun mendis kvanton. Plurfoje ni jam atentigis pri la valoro de „De Esperantist”, sed nur malmultaj sekcioj regule mendas ekstran kvanton por propagandaj celoj. Ĉar en 1952 la interesiĝo pri la someraj kursoj estis preskaŭ nula, ni decidis ne organizi tiajn kursojn en 1953. S-ro F. Weeke iniciatis la aranĝon de tradukonkursoj kaj la nombro de partoprenintoj estis kontentiga, kvankam laŭ lingva vidpunkto la sukceso ne estis ege granda. Laŭ la opi-

nio de la ĵurnistoj la lingva kapablo de multaj partoprenintoj lasis multon por deziri.

La ĉefestraro konsistis el s-ro H. J. Blokker, prezidanto; s-ro A. J. Kalma, sekretario; s-ro P. M. Mabesoone, kasisto, f-ino A. Hellinx, s-ro W. Böttcher, s-ro F. Weeke kaj s-ro C. B. Zondervan. Fine de la jaro s-ro W. Böttcher pro troa laboro ekŝiĝis. Lian taskon provizore transprenis f-ino A. Laverman, kiu antaŭ pluraj jaroj jam estis ĉefestrarano kaj do disponas pri sperto sur tiu tereno. Okazis 3 kunvenoj de la plena ĉefestraro: la adm. ĉefestraro multfoje kunvenis kaj laŭbezzone skribe kontaktis kun siaj kolegoj.

Komence de la jaro L.E.E.N. havis 31 sekciojn. Meze de la jaro likvidiĝis la anemnia sekcio en Veendam, kies anoj fariĝis ĝeneralaj membroj de nia asocio, sed en septembro fondiĝis nova sekcio en Winschoten kaj en la sama monato aliĝis la R.K.-Rondo en Rotterdam, de fine de la jaro la nombro estis 32. Komence de la jaro L.E.E.N. havis 955 membrojn, sed en la daŭro de la jaro ĝi konstante kreskis kaj la 31-an de decembro la nombro estis 1056. Kiel kutime pluraj sekciaj sekretarioj ne jam sendis la membrolistojn por la nova jaro. Antaŭ unu horo la poŝtisto transdonis al mi la listojn de Bussum kaj Almelo, sed mankas ankoraŭ Bergen, Bergen op Zoom, Boskoop, Den Haag, Groningen, Haarlem, Hilversum, Utrecht, Zaandam kaj laŭtradicie Heerenveen kaj Sneek. La plej freŝdata membrolisto de Sneek, kiun ni posedas estas antikvaĵo el la jaro 1950... Sajne ne ĉiuj funkcioj komprenas, ke la prokrasto kaŭzas ekstrajn laborojn kaj elspezojn. Kiel pluraj sekcioj sen ia komento simple forstrekis la ekŝiĝintajn anojn kaj ne klopodis varbi ilin kiel ĝen. membrojn, abonantojn aŭ donacantojn, uzante tiucele la cirkuletojn, kiujn la ĉefestraro senpaga disponigas? (Daŭrigata)

TEATRA SERVO
Jarraporto

Pluraj sekcioj en 1953 pruntis teatraĵetojn kaj skeĉojn por pliagrabiligi la kunvenojn. Al kelkaj sekcioj mi sendis materialon por ekspozicio kaj tekstojn por prelegoj. Mi apelacias por la tioma fojo al la kunlaboro de la sekcioj, kiuj nepre sendu al mi tekstojn

Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 100, Mechelen

Prezidanto: Gerard Debrouwere, Magdalenstraat 29, Kortrijk.
 Sekretario: Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, Sint-Kruis, tel. 33445 (dum la ofichoroj).
 Kasistino: F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.
 Biblioteko: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)
 U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.
 Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Raghenoplaats 9, Mechelen (tel. 136.77)
 Koresponda kurso: A. Nysstraat 37, Anderlecht

SEKRETARIA RAPORTO

(Daŭrigo)

Post tiuj klarigoj de la sekretario, la Prezidanto preparolis la proponon de la estraro eldoni komunan gazeton, kun RBLE kaj Svisa Esperanto Asocio. La sekretario kontaktiĝis kun la gvidantaj personoj de tiu lasta asocio — kiu nuntempe pro financaj malhelpaĵoj ne plu eldonas gazeton — kaj evidentiĝis ke komuna gazeto estas ebla. Poste la redaktoro pristudis la eblecojn de komuna eldono kun RBLE, kaj ankaŭ tio estas efektivebla.

La praktikaj rezultatoj estas:

1. La nuna formata enhavo de Flandra Esperantisto kaj de Nederlanda Esperantista restos la samaj, almenaŭ dum 1954. La presisto tamen uzos nian kompostadon por kunmeti, laŭ la indikoj de redaktoro, tri paĝojn de la gazetoj por RBLE kaj SES, kaj tiuj asocioj mem redaktos unu paĝon. Tiel tri paĝoj de tiuj kvar Esperanto-gazetoj estos komunaj. La elspezoj de tiuj paĝoj estos do relative malaltaj, por ĉiuj kvar eldonantoj, kaj ĉiuj tiel profitos. Ni esperas ke la ligoj nun multe pli ol antaŭe kontribuos al la redaktado de la gazeto, ĉar la artikoloj de ĝenerala intereso nun aperos en tri landoj; samtempe ni dankas la redaktoron, Sron Van Gindertaelen, kiu faros la teĥnikan laboron por kvar asocioj. Ni estu fieraj, ĉar estas nia Flandra Esperantisto kiu tiel elkreskis, trans la limoj, kiam ni, dum multaj jaroj, batalis por vivteni ĝin. Kaj ni ĉi-tie speciale pensas pri amiko E. Cortvriendt, kiu reldonis ĝin jam en 1945.

Post tiuj klarigoj, la ĝenerala jarkunveno akceptis la fondon kaj la laborplanon de la B.C.K.E. kaj la komunan eldonon.

5. Eksiĝo de 6 estraranoj kaj elekto:

La estraro submetas la jenan liston: Prezidanto: Dro Couwenberg, Cortvriendt, Drs Roose; Sekretario: Maertens G.; Protokola sekretario: s-ano Monnaerts; Kasistino: Terrijn J.; Redaktoro: Dro Van Gindertaelen; Membroj: L. P. M. Demeyer — R. Isrentant (instituto); Sino Meurrens — F. Volders (Festdirektoro).

La ĉeestantoj akordiĝas.

6. Kotizoj: restas la samaj kiel dum 1953.

La Prezidanto fermas la kunsidon je la 17^{1/2}h., dankas la estraron kaj la liganon kiuj kunlaboris al la sukceso de la jarkunveno.

M. G.

NOVAJ MEMBROJ

Por stimuli la varbadon, ni donacos konstantan premion al ĉiu varbinto de du novaj membroj (ekskluzive la familiajn membrojn). La premio konsistas el libropaketo, valoranta minimume 100 F. Speciale kunmetita de Flandra Esperanto Instituto por tiu celo. Pagante al la Kasistino, vi eventuale petu la premion.

ENKETO OKAZE DE LA LIBRO-MONATO.

Ni ricevis ĝis nun 26 plenigitajn formularojn antaŭ ol statistiki pri la ricevitaj respondoj. Ni petas lastfoje, se vi ankoraŭ posedas ekz., bonvolu ensendi ĝin al la sekretario.

PROTOKOLA SEKRETARIO

Sano Monnaers, P. Walkierstraat, 19, Sint-Pieters-Leeuw, membro de la Brusela sekcio, kiu estis proponita de la estraro kiel protokola sekretario dum la ĝen. jarkunveno en Gent, akceptis tiun oficon. Ni bonvensalutas nian junan samideanon en la estraro, kaj esperas ke li helpos nin en la malfacila organiza laboro. Ni speciale ĝojas ĉar li estas membro de la Brusela grupo, kiu dumlonge ne plu estis reprezentita en la estraro.

LA KASISTINO PAROLAS . . . DUA LISTO DE SUBTENANTOJ

F-ino B. Cornelis	150 Fr.
F-ino P. De Cock	150 Fr.
F-ino M. J. Top	150 Fr.
S-ro M. Van Gestel	150 Fr.
S-ro E. Cortvriendt	150 Fr.
S-ro F. Couwenberg	150 Fr.
S-ro G. De Boes	150 Fr.

GRAVE

Cu vi jam pagis vian kotizon? Se jes! Dormu trankvile! Se ne! Ho ve! Ĉar tiam vi ne plu ricevos Flandran Esperantiston, kiun ĉiu bona samideano ne ŝatas malhavi. Do pagu tuj vian kotizon: P.C. 2321.50 de *Vlaamse Esp. Bond*, Gent.

Plaatselijk Nieuws

Brugge: Onze winterleergang ving aan met 10 nieuwe cursisten; voor de aanwerving ervan verdient Mevr. Poelhuys alle lof.

Op 21 November vond ons jaarlijks en geslaagd Bal plaats — spijtig genoeg niet in „Grand Hotel”, want de gebruikte zaal is te klein gebleken.

Op 29 Nov. hadden wij een avond in de Stadsschouwburg met Max van Praag en L. Baret: een verheugend succes!

Een week na de geboorte-dag van Zamenhof werd een herinneringsavond met de andere locale groep ingericht: een prachtige avond! Op 2 Jan. vond ons traditioneel „Kerstfeest” plaats en de Donderdag nadien werden de bestuursleden uitgenodigd door Mevr. Roose op een prettig warm avondmaal.

Den Haag. La programo por la grupvesperoj en Februaro enhavas la jenajn punktojn:

4/2. Cerbogramastiko. Gvidantino: S-ino E. Kervers-van Tholen. Premio gajnebla.

11/2. La amasjunularo. enkonduko de S-ino J. G. Bramkamp-Weber.

18/2. Rerigardo. F-ino J. B. Lehnen, nia estinta sekretario kaj veteranino de nia klubo rakontos pri siaj travivaĵoj dum sia esperantista vivo. (milita tempo k.t.p.)

25/2. Rakontoj de S-ro Nijdam. Veraj aŭ neveraj li rakontos ilin.

Hilversum. La 9-an de Januaro 1954 naskiĝis Ieke Tine Donata filino de Ges-oj W. H. Koopmans, Vosmaerlaan

de sukcese prezentitaj teatraĵetoj kaj skeĉoj por ke la kolekto pligrandiĝu. Por afrankoj mi elspezis g. 2,30. A. J. Kalma.

3. (Korajn gratulojn, red.)

Rotterdam. La Roterdama Esperanto-Komitato organizis du kursojn, ambaŭ gvidataj de S-ro S. Pragano. La unua estas supera literatura kurso kaj la dua daŭriga kurso kaj ambaŭ daŭros de la 15a de marto ĝis la 24a de Majo. Aliĝiloj kaj informoj estas haveblaj ĉe F-ino A. C. Obbes, sekr. de R.E.K. Boezemlaan 24 B, Rotterdam N.

Trebeek. Nia tiea sekcio festis la 12an kaj la 13an de decembro 1953 la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof en ĉesto de samideanoj el Luik, Düren, Stolberg, Aken, Maastricht, Wanbach kaj Heerlen. Estis prelegoj, kantado, muziko dancado kaj ekskurso al la kastelo en Hoensbroek. La tuta aranĝo tre bone sukcesis.

Utrecht. Sekcio Utrecht faris tre bonan propagandon, ĉar elirante la stacidomon kaj transirante maldekstren la placon, oni vidas preskaŭ tuj ĉe la angulo de la stacidomplaco kaj Leidse weg sur la muro de ambaŭ apudnabaraj kafejoj kaj butikoj grandan diskon kun verda stelo. Sur la stelo klare la vorton „Esperanto” en alvaj literoj, sub ĝi la mencio: U.E.A. konsulo W. Baaten, Van Asch van Wijckskade 18.

La koncerna kafejo estas „Café de Postiljon”, stacidomplaco 2 A., kaj la butikoj estas la cigarmagazeno „De Stroomlijn”. Sur la vitro de la butikoj staras la esperantlingva teksto „Bona vendisto estas amiko”, kaj ni, esperantistoj diras: Certe, li estas en ĉi tiu kazo en du signifoj, amiko: kiel bona vendisto kaj kiel esperantisto.

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PREMION akiris post n-roj 159/160: S-ro R. Iserentant, el Brugge, por V.E.B. kaj por L.E.E.N.: P. H. Mooy, el Brusejo.

NOTU: Bonvolu korekti en la figuro n-ro 162 la horizontalajn 3 kaj 6 jene:



Solvaj akceptataj ĝis 20/II/1954.

SOLVO de 161: krespo; espero; separo; kareso; sukero; resumo; mezuro; numero; rimeno; merito; trempi; premio; perilo; leporo; kolero; koralo; pokalo; skalpo; sparko; krespo.

163. ANTAŬMETU


du literojn al ĉiu el la sekvantaj vortoj por formi novajn vortojn.

La duaj literoj, legataj en la sama sinsekvo, montras proverbon.

lito; lumo; tero; rabi; miri; rento; aktoro; preso; rabeno; rigli; opozicio; libro; signo; cento; armi; marko; terni; vico; enuo; iranto; sekto; vendo; cedi; servi; mato; testo; ringo; rano; mento; spiri; plori; ganto; azuro; piro.

164. KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. altpreza; definitiva skribaĵo. 2. difekti ies korpon. 3. korpovorto (R); maŝine deklami (R). 4. vivĉ kaj gaje (R). 5. scienc esplori (R); skatoleto (R). 6. ĝi elstaras super la maro (R). 7. samvalora; suĉilo de kulo (R). 9. li plenumas la rolon



de iu alia (R). 11. ĝi ebligas vidi malproksimen; muzika instrumento (R). Vertikale. 1. vitrosimila glazuro (R). 2. disigi (R). 3. kortbirdo (R). 4. flugmaŝino (R). 5. nimfo. 6. rezino donanta bonodoran fumon (R). 7. Li ne loĝas en la kamparo. 8. li vivadas en Afriko. 9. aparta lingvo de samprofesiuloj (R). 10. parto de kelkaj mebloj (R). 11. okulparto (R).

La solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro G. J. Teunissen, Burg. Tellegenstraat, 21 hs., Amsterdam-Z.; kaj Flandra Ligo al S-ro F. Couwenberg, Koningsinnelaan, 14, Blankenberge, antaŭ 20/II/1954.

MIGRADO, INTERNACIA PROBLEMO

de Hugh Gibson

Direktoro de la Interregistara Komitato por Eŭropa Migrado.

Estas nova kaj kuraĝiga antaŭeniro de internacia agado ke ŝtatoj estas kunigintaj, por helpi pri transmara migrado el Eŭropo. Simile al aliaj laŭdindaj klopodoj faritaj de la socio de liberaj ŝtatoj en ĉi tiu maltrankvila postmilita periodo, estas ago kiun ili estas devigitaj fari. La kronika problemo de troloĝateco en okcidenta Eŭropo alprenis tiel danĝerajn proporciojn dum la lastaj dudek jaroj ke ĝi minacas renversi kiam ajn ekonomian kaj politikan stabilecon atingitan post la fino de la dua mondmilito.

La termino „troloĝateco“ estas malpreciza kaj facila vorto por situacio kiu estas tute nedifinebla sciencie sed kun kies urĝeco ni konatigas ĉiutage pli.

Estas treege malfacile taksati la nombrojn de tiel nomitaj superfluaĵoj homoj nuntempe en Okcidenta Eŭropo kies ĉeesto estigas ekonomian ŝarĝon kaj politikon minacon. Diversaj institucioj estas penintaj fari tiajn taksojn — kaj tiuj ĉi etendigas de tri al kvin milionoj — sed ili konfesas ke en ĉi tiu epoko de grandega scienca progreso estas preskaŭ neeble doni iun ajn firman kaj fiksitan proporcion plejbonan de enloĝantaro rilate al vivrimedoj en ŝtato.

Estas sufiĉe certe tamen ke troloĝateco estas urĝa problemo por kelkaj eŭropaj landoj. Parolante pli homare, estas sufiĉe certe ke milionoj da homoj estas devigitaj vivi je tute nesufiĉaj vivoniveloj en regionoj kie aliaj labor-kapablecoj ne povas estis plene utiligitaj, dum tiuj samaj homoj povus esti tre valoraj se ili povus migri al landoj kie oni urĝe bezonas iliajn spertojn kaj kapablecojn. Estas transmare vastaj neprogresintaj teritorioj kiuj ne povas plene utiligi siajn eventualajn rimedojn sen ordigita enfluo de eŭropa „homforto“. Estas neimageble ke ni daŭre malŝparas la kapablecojn de farmistoj kaj lasas produkton teron neplanta kiam la mondo bezonas nutraĵojn kaj dum ĉiu lando de la okcidenta mondo grave bezonas la aldontan strategian forton de homsufiĉeco rilate al agrikultura produktado. Kaj tio kio estas vera pri farmistoj estas vera pli aŭ malpli rilate al ĉiuj kategorioj de neokupataj aŭ nesufiĉeokupataj laboristoj en Eŭropo.

Krom ke estas ekonomia absurdaĵo, la problemo estas reala socia kaj politika danĝero. Jam en la jaro 1946, eminenta ekonomisto, la Profeso William Roepke avertis pri tiu danĝero: „Se ĉiela pordo de enmigrado estas fermataj kaj estiĝas pli kaj pli da ŝtatoj kie oni ne povas akiri oficon eĉ de nura purigisto se oni ne estas ano de tiu ŝtato — tiam vere la politikaj landlimoj estigas gravegan ekonomian problemon, tiam „loĝspaco“ ĉesas esti nur lertaĉa devizo de imperialista propagando, kaj tiam la enloĝantaro de la pli malriĉaj landoj ne povas ne rigardi avarece kaj envie la pli feliĉajn ŝtatojn. Tiam internacia klasbatalo inter tiuj ŝtatoj povus fariĝi tragedia realeco.“

Post 1946 la problemo daŭre iĝis pli

granda kaj pli urĝa. La premoj de troloĝateco en Italujo, Germanujo, Aŭstrujo, Nederlando kaj Grekujo — citante la plej tipajn „elmigradajn landojn“ — pli kaj pli akutiĝis pro kelkaj kialoj, enhavante la longdaŭran malpliigon de migradaj movadoj, la perdo de teritorioj kaj kolonioj kaj la malpliigrandigo de eneŭropa komerco sekve de streĉitaj rilatoj inter okcidento kaj oriento. Aldone, okcidenta Eŭropo vidas konstantan enfluan de politikaj rifuĝintoj kiuj aldonas novan ŝarĝon al la ekonomioj de jam troplenaj landoj, kaj kiuj povas esperi la rekonstruadon de deca vivo por si kaj siaj familioj nur se ili estas permesataj migri al transmara landoj prezentantaj sufiĉajn ŝancojn al laboro.

Por helpi malŝarĝi Eŭropon de ĝia surplusa enloĝantaro kaj samtempe helpi la progresigon de maltroloĝataj transmara areoj, 16 ŝtatoj de la libera mondo kunigis en Decembro, 1951, por starigi la Interregistaran Komitaton por Eŭropa Migrado (IKEM). Ili sciis ke migrado ne estis la sola solvo de la problemo sed ili elkomprenis ke ĝi estis necesega parto de la entuta solvo. Ili ankaŭ sciis — kion la sperto de ĉi tiuj postmilitaj jaroj abunde pruvis — ke normala, spontanea migrado ne sufiĉas nek por malpezigi la ŝarĝon de enloĝantaro de troplenaj eŭropaj landoj nek por ripari la mankon de la homomalsatantaj transmara teritorioj.

Fakte, apenaŭ mi povas pripensi kampon de agado kie internacia planado pli urĝe necesas. La migrado estas kompleksa procedo kiu komencas en la ŝtato de origino (kie la migronto estas preparanda mense kaj materiale por sia nova vivo), daŭras sur la ŝipoj kiuj portas la migranton direkte al ties nova hejmo kaj finiĝas nur monatojn poste en fremda fora lando kiam la migranto estas lokiĝinta kaj firme starigita kune kun sia familio.

Tute tra ĉiuj tiuj stadioj internacia helpo estas necesa, almenaŭ por multaj kategorioj de migrantoj! Plue la esplorado de novaj okazoj de migrado, la efektivigo de duflankaj kaj multflankaj interkonsentoj, la evoluigo de novaj metodoj por la edukado de migrantoj, la normigo de pli efikaj kaj rapidaj kriterioj de elekto, la samtempa movo de migrantoj de multaj ŝtatoj de origino al multaj ŝtatoj de finalveno, ĉiuj estas agoj klare en la sfero de internacia kunlaborado.

Tamen kiam la Interregistara Komitato por Eŭropa Migrado estis kreata oni donis al ĝi limigitan taskon dum limigita tempoperiodo. Laŭ la fundamenta rezolucio tiam akceptita la celo de la Komitato estis „fari arandojn por la transportado de migrantoj, por kiuj ekzistantaj faciligoj estas nesufiĉaj kaj kiuj alie ne povus esti movataj, el iuj eŭropaj ŝtatoj havantaj surplusan enloĝantaron al ŝtatoj transmare kiuj prezentas okazojn por bonorda enmigrado, konforme al la politikoj de la koncernataj ŝtatoj“. Eĉ se ĉi tiuj taskoj ŝajnas limigitaj kiam oni komparas ilin kun la grandeco de la pro-

VERDLANDO VOKAS

Listo de radiodissendoj en aŭ pri Esperanto. Tempindiko: M.E.T. (= mez-eŭropa tempo) valida ankaŭ en Belgujo, Nederlando kaj Svisujo.

Mallongigoj: I = informoj. P = paroladeto. K = kurso. M = muziko.

Lunde:

19.30—20.00 La Coruna (Hispanujo), 250 m.: P. kaj K.
22.35—22.40 Vieno I, 25,46 m., 513 m.: P.
23.15—23.30 Hilversumo II, N.C.R.V., 298 m., 188 m.: P kaj M: „La Evangelio en Esperanto“. (Nur unufoje monate).

Marde:

12.55—13.00 Berno 16,87 m., 31,46 m., 48,66 m., 75,28 m.: P de d-ro Arthur Baur.
15.30—15.45 Montevideo (Urugvajo), 280 m.: P (nur la unua mardo de ĉiu monato).
16.00—16.15 Vieno II, 25 m., 30 m., 41 m., 48 m., 203 m.: P.
18.35—18.40 Berno, 16,87 m., 31,46 m., 48,66 m.: Ripeto de posttagmeza.
23.30—24.00 Valencio (Hispanujo), 200 m.: P.

Merkrede:

16.45—17.00 Graz (Aŭstrujo) 417,2 m.: K (nur ĉiudusemajne).
17.00—17.10 Caramulo (Portugalujo), 205 m.: P de Alfredo Sales.
18.50—19.10 Romo, 31,35 m., 49,92 m.: P de Luigi Minnaja.
20.30—20.45 Barcelono, 360 m.: P „La voĉo de la mondo“.
23.15—23.20 Hilversumo I, 402 m., V.A.R.A.: I.

Ĵaŭde:

08.30—08.35 Rijsel (Lille), 218 m.: P. de prof. Labit.
09.30—09.45 Parizo, 348 m.: K de Pierre Delaire, Orléans.
12.55—13.00 Berno, 16,87 m., 31,46 m., 48,66 m., 75,28 m.: P de prof. d-ro E. Privat.
18.35—18.40 Berno, 16,87 m., 31,46 m., 48,66 m., 75,28 m.: Ripeto die posttag-
24.05—24.20 Zagreb (Jugoslavujo), 264,7 m.: P (meza P.)

Vendrede:

18.50—19.10 Romo, 31,35 m., 49,92 m.: P. de prof. d-ro V. Musella.

Sabate:

09.30—10.00 Rio de Janeiro, 30,71 m., 375 m.: K kaj I.
23.15—23.20 Hilversumo II, 298 m., 188 m., K.R.O.: I.

Informoj kaj petoj:

Bone konservu ĉi-supran liston! — Pro spacomanko ni ne povas en ĉiu numero aperigi ĝin. Nur kiam estos gravaj modifoj, ni informos niajn gelegantojn, al kiuj ni deziras bonan kaj oftan Esperantoradioaŭskultadon (kia vorto!) en 1954-a!

Radio Roma. — Jen detaloj pri programoj en febr. 1954: 3/II: Novajoj el Italujo. 5/II: La kultura valoro de Esperanto ĉe la radio kun aparta konsidero pri Radio Roma. 10/II: Florencaj kanzonoj. 12/II: Respondoj al la geaŭskultantoj sendintaj leteron kaj bibliografio. 17/II: Sardino, la insulo de la 26-a itala Esp.-kongreso. 19/II: Italaj belartaj urboj: Napoli. 24/II: Poeto Govoni — premio Marzotto 1953. 26/II: Karnavala paratezo. Adresu skribajn aplaŭdojn al Radio Roma, Castella postale n-ro 320, ROMA (Italujo). De aliaj stacioj ni ne ricevis detalojn.

Informojn pri Esperanto-radio-dissendoj sendu ne nur la radio-stacioj, sed ankaŭ la radio-geaŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, TJKERWERD (Frislando), Nederlando.

blemo, estas memorinde ke, post multaj jaroj de pli aŭ malpli senfrukta internacia diskutado, ĉi tio estis la unua peno eklukti kun la problemo sur bazo konkreta kaj praktika.

La sperto akirita dum la komenca periodo de funkciado pruvis ke helpo nur pri transportado, kvankam tio estas tre grava, ne sufiĉas plilargigi la fluon de migrado el Eŭropo. Tial la Komitato estis preta sin okupi pri aliaj formoj de agado, ampleksantaj aliajn fazojn de la migrada procedo.

Hodiaŭ, post preskaŭ du jaroj da aktiveco, estas eble rerigardi la faritaĵojn ĝis nun atingitajn kaj vidi pli klare la vojon antaŭen.

Unue, la membraro. De la originalaj 16 fondintaj ŝtatoj, la membraro de la IKEM kreskis ĝis 24, enhavante ĉiujn elmigradajn ŝtatojn de Eŭropo, la ĉefajn enmigrantajn ŝtatojn — okelilien Latina Ameriko — kaj kelkajn aliajn ŝtatojn, ekzemple Francujo, Belgujo kaj Svislando, kiuj kvankam ne rekte koncernataj komprenas la socian ekonomian kaj politikan gravecon de la problemo.

Due, la Komitato estas movinta pli ol 145,000 homojn el Eŭropo al novaj hejmoj transmare. El ĉi tiuj pli ol 40,000 estis rifuĝintoj kaj 26,000 „Volksdeutsche“ (laŭoriginaj germanoj) elpelitoj. La ĉefaj ricevantaj ŝtatoj estis Usono, kiu enlasis 43,000 enmigrantojn. Kanado kun preskaŭ 40,000, Aŭstralio, 25,000, Brazilo 19,000 kaj aliaj ŝtatoj de Latina Ameriko proksimume 10,000.

Por 1954, la Komitato celas movi 117,600 eŭropajn migrantojn transmaren. Alia atingo de la Migrada Komitato estas la plibonigo de „teknikaj servoj“, necesaj por certigi ke la migrantoj helpataj daŭre instalos sin en siaj adoptitaj landoj, kaj ke farante lokon por si mem ili ankaŭ helpas fari lokon por aliaj jam venontaj.

Teknikaj servoj ampleksas plenan diversecon de iniciatoj. En Italujo kaj Nederlando laboristoj en la metala kaj konstruada metioj antaŭ ol foriri al Brazilo trapasis monatojn de instruado pri brazilaj labor-metodoj kaj pri la portugala lingvo. Grekoj elektitaj por relokiĝo en Aŭstralio kaj Brazilo lernas sian novan lingvon hejme kaj instruado daŭras eĉ sur la ŝipoj kiuj portas ilin transmaren. Interkonsento estas farita kun Argentino inaŭguri farmlernejon en la provinco de Buenos Aires, kie eŭropaj farmistoj pasigos ses monatojn de intensa studado de la hispana lingvo kaj de lokaj agrikulturaj metodoj antaŭ ol ili translokiĝos al siaj propraj farmbienoj. Informaĵo por orienti la migrantojn estas kolektita kaj disdonita al kandidatoj por migrado. En Italujo, Germanujo kaj Aŭstrujo, la Komitato helpas al an-

taŭelektado de la kandidatoj prezentataj por vizoj al konsuloj aŭ al naciaj elektantaj senditaroj. En Grekujo kaj en la uroo Trieste IKEM eĉ plu agas kaj helpas al la migranto serpenti tra la burokrata labirinto kiu situas inter la petanto por migrado kaj fina enŝiĝo. Fine, en Brazilo, la Komitato estas reprezentata je la Lokiga Komisiono kiu kolektas kaj taksas petojn por enmigrantaj laboristoj kaj kiu parigas novevenintojn al laborokazoj.

Tiaj servoj estas esencaj por realigi ekzistantajn eblecojn de migrado sed ili ne povas krei novajn okazojn. Por tio la Komitato aŭventure eniris alian vojon — la stimuladon de projektoj de kampara koloniigo.

Estas preskaŭ neniu ekonomia ekspertizo pri la problemoj de la progresigo de Latina Ameriko kiu ne elmontras diversajn manierojn je kiuj enfluo de kompetentaj eŭropaj laboristoj helpus tiun procedon. Aliflanke, la plejparto de ĉi tiu landoj bezonas ian financadon por sukcese komenci. Laŭ la vidpunkto de Eŭropo la sukcesa evoluiĝo de vastaj projektoj de kampara koloniigo estas egale necesaj se estas trovota solvo de la tiea problemo de surplusa enloĝantaro. Esploraj interparoladoj kun internaciaj kaj aliaj bankaj institucioj malkaŝis ke ili estis pretaj konsideri financan subtenon al fidindaj projektoj. Do, la mono estas fakte havebla por investado al fidindaj projektoj; Eŭropo havas la homojn kaj abunda tero kuŝas preta kaj atendanta. Kio estis bezonata estis la kataliza agento kiu povis miksi tiujn elementojn. Tion la Komitato penas fari. Estas tasko vere farinda, ĉar la starigo de sukcesaj projektoj de kampara koloniigo ne nur provizas novajn elirejojn por eŭropaj farmistoj sed ankaŭ kreas novajn labor-okazojn por ĉiuj aliaj laboristoj kiuj estas bezonataj por konsistigi la novan ekonomian komunumon.

Fine, atingi pli racion distribuon de enloĝantaro estas malfacile kaj multekosta tasko kiu postulas pozitivan internacian kunlaboradon. Mi estas konvinkita ke kun forta laboro, bonvolo kaj sufiĉaj rimedoj ĉi tiu praktika ilo kreita — la Migrado Komitato — povas efike pritrakti la problemon. La alternativo, malsukceso, estus duoble danĝera ĉar ĝi ne estus limigita al tuja repuŝo. Ĝi konvinkus multajn ke internacia kunlaborado estas pruviginta fiasko, kun la sekvo ke, dum almenaŭ multaj venontaj jaroj, utilis kiel preteksto por bloki estontajn proponojn trakti la problemon sur internacia bazo. Ni absolute ne povas toleri fiaskon kiam ni scias ke ni povas sukcesi.

Trad: R. Harry; kontrolis: H. Jacob.